LINGVA KURSO - progresanta nivelo: Grésillon, Francio. Apr. 20-27, 2013

Stefan MacGill

La kurso-teksto estos *Nemave Edifi*, verko de la kursgvidonto, eldonita de Flandra Esperanto-Ligo en 2007. Stokoj estos haveblaj surloke je €19,99 (la prezo ĉe FEL).



Ni rapide studos la unuan teatraĵon *Neniu problemo* kaj plenumos la aldonitajn ekzercojn kaj rol-ludojn. Ni krome plenumos komunan problem-solvan taskon el la verko *Tendaraj tagoj*, kajero 2. Tiu ne estas deviga kurso-teksto (ni disdonos fotokopiojn), sed se vi posedas la verkon (aŭ volumon 3), bonvolu kunporti ilin. Ĉiuj el tiuj rilatas al la fame (ne)konata esperanta spiono 005, kiu senlace defendas la liberecon kaj ekziston de nia kara popolo.

Ekkoninte la rolulojn, ni pluiros al la dua teatraĵo: 'La Martelo'. Tio malkaŝos al vi sekretojn de niaj Universalaj Kongresoj, kaj inkluzivos eĉ reludigon de la fama kaj feroca ATA-ITA debato.

Do, iel la kurso similos al tiu en Agay (2009) kaj Plouezek (2010), sed kun provo kovri pli da materialo. Trakto de la unua teatraĵo servos ĉefe pro konigi al ĉiu la rolulojn.

Ĉefa celo de la kurso estos sproni la parolkapablon, per plenumo ede ekzercoj, dialogado, rol-ludoj ks. Ni dediĉos tempon al gramatikaj temoj, precipe pri la transitiveco de verboj, uzado de akuzativo kaj la sufiksoj -ig- kaj -iĝ-. Laŭpete ni povos esplori aliajn temojn. Kursanoj povos konakti la gvidanton ĉe <stefan.macgill@gmail.com>. La kurso estas celata esti pure lingva kurso, sed se parto-prenontoj volos studi aŭ diskuti pedagogiajn temojn, ankaŭ tio eblas. Tiucele, plia libro por kunporti, se vi posedas ĝin, estas la *Manlibro pri Instruado de Esperanto*, eldonita de ILEI kaj E@I en 2006 kaj 2008.

Ĝis ekvido en la kurso!

Budapeŝto, 4an de decembro, 2013